

Johann Friedrich Hahn,
Amo regu super ĉio!

tradukita de N. N. 56

Celon altan ni aliru,
Elektitan per la koro.
Celon indan ni defendu
En plenplena eĉ laboro.

Laŭtavoĉe ni elvoku
Inter homoj en sufero:
Amo regu super ĉio!
Paco estu sur la Tero!

Tedajn barojn ni forigu,
Homoj ĉiuj iĝu fratoj!
Ord' de l' mond' al ni utilu.
Malgraŭ malhelpaĵoj ligu
Amo nin en homrilatoj. -
Suno de la Ĝojo brilu!

*Traduko de la Germana poemo "Liebe herrsche über allem" de JOHANN FRIEDRICH HAHN (*1753-12-28 – †1779-05-30) en Esperanton de N. N. 56.*

Arg-822-1649 (2013-02-06 23:11:39)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la jaro 1948 en la revuo "Heroldo de Esperanto", laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann.